Carl Riedel,

# Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

. . .

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* CARL RIEDEL *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

*MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)*

*La muziknotojn vidu jen:* http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038 .